nia voĉo

madrida esperanto-liceo januaro 2016

## BALDAŬA ĜENERALA KUNSIDO DE MEL

La lundon 25an de januaro okazos la ĝenerala kunsido de MEL. Krom la kutimaj traktendaj aferoj, ni devos elekti novan kasiston ĉar José Francisco Platas demisias pro siaj san-problemoj.

Siatempe la prezidanto sendos al ĉiuj membroj la formalan alvokon.

## SUKCESA ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO

Por festi la librotagon kaj naskiĝan datrevenon de Zamenhof, la 12an de decembro, sabate, kiel anoncite, MEL luprenis aŭlon en la kultura Centro Sociocultural Mariano Muñoz, en la kvartalo Usera, strato Cristo de Lepanto.

La programo komenciĝis je la 11:00 per bonveniga saluto de la prezidanto de Esperanto-Liceo de Madrid, Manuel Parra.

Je la 11:30 Miguel Fernández prezentis kelkajn novajn librojn, inter kiuj la traduko de "Bohemiaj lumoj" (pri tio vidu poste).

Poste, Jorge Camacho prezentis kelkajn poemojn el sia nova, baldaŭ eldonota, poemaro.

Eksterprograme, profitante la ĉeeston de nia ekstremadura samideano José María Salguero (Kani), li prezentis la venontan hispanan kongreson de Esperanto, okazontan komence de julio en la urbo Herrera del Duque.

Je la 13:00 disvolviĝis teatra legado: "La participoj" , komedieto de Marjorie Boulton, fare de la gelernantoj el la nuna kurso de esperanto. Eĉ se temis pri amatora, lega prezentado, la ĉeestantoj ĝuis la komedion kaj sincere aplaŭdis la meritplenan provon.

Je la 14 ni ĝuis komunan tagmanĝon en la halo de la kulturejo, aranĝatan de la tiea kafejo.

Post la manĝo la programo plu antaŭeniris per prezentado fare de Alex Escobedo pri la reta esperantista mapo kaj per debato pri varbado. Poste Felix Jiménez prelegis pri "ZEOj en Varsovio kaj surprizo en Istanbulo".



Je la 17:00 okazis spektaklo de magio fare de nia italia samideano Massimo Collo, nun loĝanta en nia urbo, kaj poste Juan del Castillo gvidis tabloludojn.

Je la fino, kelkaj parto-prenantoj ĉeestis hispan-lingvan teatran prezenton en la kulturcentro.

Kiel decas pro la tago, dum la tuta tago pretis malgranda libroservo. Entute preskaŭ trideko da esperantistoj ĉeestis la feston dum la tago, kaj ĝenerale ĝuis la programon.

## ELDONITA LA TRADUKO DE "BOHEMIAJ LUMOJ"




Kiel anoncite kaj menciite, dum la celebrado de la Tago de Esperanto en Madrido estis prezentita vera literatura juvelo: la traduko al Esperanto de "Bohemiaj Lumoj", teatraĵo de la verkisto Ramón María del Valle-Inclán, ĉefa ekzemplo de la ĝenro nomata *esperpento*. La tradukisto estis nia samasociano Miguel Fernández, kaj pri la eldono zorgis Madrida Esperanto-Liceo, kun teknika helpo kaj apogo de la Libroservo de SATeH. Temas pri la 11-a libro de la serio "Hispana literaturo".

La 21-an estis organizita festo en la sidejo de HEF, kie Miguel deklamis kaj klarigis iujn pecojn de la teatraĵo (kaj kie ni profitis la okazon por manĝeti kaj trinketi por adiaŭi la jaron)

Ekde la lundo 4a de januaro estos disponebla en la sidejo la verko. La ĝenerala prezo estas 10 eŭroj. Specialan prezon de 8 eŭroj ĝuos la membroj de MEL kaj tiuj, kiuj ĝin antaŭmendis dum la Zam-festo. La ekstermadridaj esperantistoj kaj asocioj povas mendi ekzemplerojn kontaktante la Liceon.

## AUGUSTO CASQUERO EN HONORA "PANTEONO"

Nia sam-asociano kaj eksa prezidanto de MEL, Augusto Casquero estis elektita al la "Panteono", la listo de elstaraj instruistoj, kiujn nomumas la retejo *edukado.net*. Li estas la unua el la listo devenanta el Hispanio. Legu la retan informon ĉe la retpaĝo http://edukado.net/novajhoj?id=592. Gratulon al li, nome de la madrida esperantistaro!

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ




En la pasinta unuasabata renkonto, la 5-an de decembro en la ĉokolatejo Valor, ĉeestis 14 homoj! Ni probable ripetos la sperton la venontan 9-an de januaro (ne la 2-an, pro la festoj). Ni anoncos la detalojn en la sociaj retejoj. Vi certe venos, ĉu ne?

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30, jam depost la 4-a de januaro.

Por esti informitaj pri la novaĵoj de la movado en Madrido kaj aliloke, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel kaj la retan diskutliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/. Ankaŭ en Fejsbuko https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/ kaj Meetup.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com